

# AMO 73 venis al sukcesa fino

Tiu Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazis kunlaboro kun nia ekonomia kaj komerca Faka Asocio, IKEF. La AMO-programo kunlaboris kun multaj Fakaj Asocioj tra la jaroj: ILEI, IFEF, ISAE pere de KAEST, kaj la siatempa Monda Turismo. Nun, ni aldonas kunlaboron kun IKEF. Dua atingo estas la aldono de plia lando al la AMO-programo, ĉar la seminario estis lerte gvidata de s-ro Yas Kawamura el Japanio. La seminarion mem pere de *Zoom* altiris 53 partoprenintojn, kun samtempe viva elsendado en la kanalo 'UEA Viva' ĉe Jutubo, danke al la kunlaboro kun Luis Obando en Kolombio, kaj kunlaboro kun s-ino Park el Koreio, por plusendado per VooV, sistemo vaste uzata en Ĉinio kaj Azio. Do, almenaŭ 80 partoprenintoj, kredeble pli! Laŭ nia scio, nun okazis la unua virtuala AMO-seminario dissendita pere de tri distribu-sistemoj. El inter la landoj de partoprenintoj, ni sukcesis rimarki la sekvajn: Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉinio, Germanio, Hispanio, Hungario, Israelo, Italio, Japanio, Kanado, Koreio, Nepalo, Tanzanio, Ukrainio, Usono kaj Vjetnamio.

Vidu ekrankapton de dudeko da partoprenintoj sube.

Ligilo al la prelego de Fabricio Valle el Brazilo:

<https://www.slideshare.net/fabriciovalle/prelego-rusio>.

Pliaj programeroj kaj grupfotoj troveblas ĉe: [www.ikef.info](http://www.ikef.info)

Raporto el la 30a de majo.

